
# La centjara datreveno sur la sojlo de 30-jariĝo

Al la venontaj jubileoj de la landa organizaĵo

# Komenco

Plejparto de la unuaj esperantistoj estis rusianoj.



ADRESARO

DE LA PERSONOJ

KIUJ ELLERNIS LA LINGVON

„ESPERANTO".

Serio I.

(№ № 1 ĝis 1000).

Списокъ лицъ, изучившихъ языкъ „Эсперанто".

Серія 1.

(№ № 1 до 1000).

VARSOVIO.


L. Zamenhof, str. Przejazd N-o 9.

1889.

# Antaŭrevolucia Esperanto-movado

ĝis 1917

# «Espero» — la unua oficiala Esperantista societo en Rusio




# La unuaj rusiaj Esperanto-gazetoj

1904–1905

- «Esperanto» (redaktoroj: Ilja Ostrovskij, Aleksandr Asnes);
- «Ruslanda Esperantisto» (redaktoro: Aleksandr Asnes).

1908

- «Espero», suplemento al «Vjestnik Znania».



# Ruslanda Ligo Esperantista

- Rezulto de la unuiĝo de „Espero“ kaj „Esperanto“ fine de 1908.
- Prezidanto: Aleksandr Postnikov (nask. en 1880).
- Je la komenco de 1911 havas proksimume 30 filiojn kun ĉirkaŭ 900 membroj.
- Tamen multas ankaŭ memstaraj societoj.

# Unua Ruslanda Kongreso de esperantistoj (Peterburgo, 1910)



# Fiasko de RLE

- 28.03.1911 — aresto de Postnikov.
- Fermo de RLE kaj ĝiaj filioj.

# Revigliĝo

- Daŭre funkcias memstaraj societoj.
- Poiomete kreiĝas novaj.
- Restarigo de «Espero» (1913).
- La dua kongreso de rusiaj esperantistoj (1913, Kievo) sub prezido de kapitano Iljaŝeviĉ.

# Antaŭmilita periodo en Sovetunio

1917–1937

# Postrevoluciaj jaroj

- Libereco, malapero de cenzuro.
- ~ 100 esperantistaj grupoj en Rusio en 1918–1919.
- ~ 100 Esperanto-gazetoj.
- Manko de centra organo.

# Sovetlanda Esperantista Unuiĝo

- La 3-a Ruslanda Esperantista Kongreso (Petrogrado, **1921**).
- ~ 160 delegitoj.
- 1) la Esperanto-movado estis deklarita alkonformigenda al la nova reĝimo;
  2) estis decidite, ke ĉiu esperanta aktivado estu plene centrigita ĉe la ĵus fondita organizaĵo — **Sovetlanda Esperantista Unuiĝo**.
- La prezidanto de SEU — Ernest Drezen.



# Ernest Drezen

- La prezidanto de SEU ekde ĝia fondo en 1921 ĝis sia kaj ĝia morto en 1937.



*Ernest Drezen,*
Moskva, Sovet-Unio.

# Sovetrespublikara Esperantista Unio

- Alinomigo de SEU:
  **Sovetlanda Esperantista Unuiĝo → Sovetrespublikara Esperantista Unio**
  (dum la 3-a Kongreso de SEU en Leningrado, 1926)

# Agado de SEU

- Eldona agado («SEU-gazeto» aliaj eldonoj).
- Kvin kongresoj de SEU.

| Numero, jaro | Loko |
|---|---|
| 1-a, 1923 | Moskvo |
| 2-a, 1925 | Moskvo |
| 3-a, 1926 | Leningrado |
| 4-a, 1928 | Moskvo |
| 5-a, 1931 | Moskvo |




- Ortodoksa marksismo.
- Ligoj kun SAT (fine ŝiritaj).

# Ĉesigo de SEU en 1937

- Aresto kaj mortpafo de preskaŭ ĉiuj gvidantoj.
- Fakta ĉeso de la agado sen oficiala malfondo.

# Postmilita periodo

1956–1991

# Malsukcesa provo refondi SEU

- Refonda kunvenon 05.05.1956 en klubejo «Idealo» en Moskvo.
- Ĉirkaŭ 150 partoprenantoj.
- Decidite restarigi SEU. Elektita organiza komitato kun Jevgenij Bokarjov kiel la prezidanto.
- La afero haltigita de A. Nikiforov (sekretario de Moskva partia komitato).

# VI Festivalo de junularo kaj studentoj

- Lernogrupoj antaŭ la 6-a Festivalo en Moskvo en 1957
- Moskva E-klubo «Fajrero» (1957)
- Rememoroj de A. Ĥarjkovskij: http://esperanto-ondo.ru/H-hark32.htm



# Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj ĉe CCOД

- Fondita en 1962, funkciis ĝis 1979.
- Ŝtata instanco por kontroli esperantistojn.
- (Mal)Permesoj kaj organizo de grupoj por eksterlandaj vojaĝoj.
- Eldonado: revuo «Paco», diversaj broŝuroj kun tradukoj ktp.


# Sovetia Esperantista Junulara Movado

- 1964 — «Adresaro de junaj Esperanto-aktivuloj» fare de A. Gonĉarov
- 1965 — lanĉo de SEJM (V. Samodaj, B. Kolker, A. Gonĉarov)
- 1966 — fonda kunveno de SEJM dum tendaro apud Kolomna
- La unua prezidanto — A. Gonĉarov
- 1979 — malfondiĝo



# Agado de SEJM



# Konferencoj de SEJM




**Aŭgusto de 1976**



# Asocio de Sovetiaj esperantistoj


- 1979–1989
- Unua postmilita oficiala Esperanto-organizaĵo en USSR.
- Prezidanto — Magomet Isajev.
- Tute kontrolita de KPSU organizaĵo



# Agado de ASE

- Triobliĝo de la kvanto de E-kluboj en la lando (ĉirkaŭ 250 E-kluboj fine de la 1980-j)
- Informa bulteno (redaktoro: de Nikolaj Zubkov).
- Konferencoj:

| Numero, jaro | Komentario |
|---|---|
| 1-a, 1979 | 101 delegitoj, fondo de ASE |
| 2-a, 1982 | |
| 3-a, 1989 | 212 delegitoj, refondo de SEU |



# Refondo de Sovetrespublikara Esperantista Unio

- 24.01.1989 — la 3-a konferenco de ASE (Moskvo, en ejo de la E-klubo Lev Tolstoj).
- Decidite rekomenci agadon (SEU).
- La konferenco anoncis sin la 8-a Kongreso de SEU.


- La prezidanto de SEU: Vladimir Samodaj.
- 6 vicprezidantoj: V. Arolovič, A. Gončarov, A. Kazakov, B. Kolker, S. Kuznecov, A. Melnikov.



# Agado de la nova SEU

- 1989–1991
- Aliĝo al UEA
- Informbulteno de SEU
- La 9-a Kongreso de SEU en 1990



# Postsovetia periodo

Ekde 1991

# Rusia Esperantista Unio

- Fondita 28.12.1991 dum la 10-a Kongreso de SEU (Kolomna).
- Heredanto de SEU (1921–1938, 1989–1991).
- Celoj:
  - popularigo kaj disvastigo de la lingvo Esperanto;
  - plifirmigo de la paco, evoluigo de la internacia kunlaboro en ĉiuj sferoj de la homa agado helpe de la lingvo Esperanto.



Viktoro Aroloviĉ

Rusia Esperantista Unio

Российский союз эсперантистов

# Gvidorganoj de REU

- Konferenco de REU
- La prezidanto kaj la Estraro
- Komisiitoj kaj komisionoj
- Reprezentanto ĉe UEA

Okazis 21 konferencoj de REU, la lasta №30 en 2019.

La numerado de ili inkluzivas kongresojn de SEU/ASE/SEU.

| Jaroj | Prezidantoj |
|---|---|
| 1991–1993 | Viktor Aroloviĉ |
| 1993–1994 | Andrej Ananjin (Grigorjevskij) |
| 1994–1995 | Nikolaj Gudskov |
| 1995–1997 | Aleksandr Korĵenkov |
| 1997–2000 | Abduraĥman Junusov |
| 2000–2001 | Andrej Ananjin (Grigorjevskij) |
| 2001–2002 | Georgij Kokolija |
| 2002–2005 | Nikolaj Gudskov |
| 2005–2009 | Andrej Grigorjevskij |
| 2009–2010 | Miĥail Ĉertilov |
| 2010–2013 | Grigorij Arosev |
| 2013–2019 | Svetlana Smetanina |
| 2019–2021 | Aleksandr Lebedev |

# Aktuala Estraro

**Aleksandr Lebedev** (Jegorjevsk), la prezidanto;

**Svetlana Smetanina** (Moskvo), 1a vicprezidanto;

**Nikolaj Gudskov** (Moskvo), 2a vicprezidanto;

**Irina Gonĉarova** (Odincovo);

**Aleksandr Mitin** (Niĵnij Novgorod).

***Komisiitoj:***

**Viktor Aroloviĉ** (Moskvo) – komisiito pri dokumentaro;

**Aleksandr Lebedev** (Moskvo) – kasisto.

***Kontrol-revizia komisiono:***

**Gennadij Basov** (Tomsk) — prezidanto;

**Larisa Ŝapoŝnikova** (Arĥangelsk) — membro de la Komisiono;

**Sergej Ĵilejkin** (Sosnovoborsk) — membro de la Komisiono.

***Komitatano A por UEA*** — **Svetlana Smetanina**.

# Membreco

- Individuaj membroj (la jarkotizo 250 ₽)
- Aligitaj membroj (grupo ne malpli el 5 homoj, 200 ₽/homo + 300 ₽ unuafoje)
- Subtenantoj (> 250 ₽)

Membroj de REU ĉe la aĝo < 31 jaroj aŭtomate estas membroj de REJM


Krome:


- Kandidatoj (senpage, en la aĝo >= 14 kaj < 18);
- Amikoj de REU (pagas ajnan sumon).

En la jaro 2019 REU havis 203 membrojn, 3 kandidatojn kaj 3 amikojn de REU.

# Eldonagado




Redaktoro: Nikolaj Gudskov.

# Informa agado

Gvidanto de la labordirekto: Irina Gonĉarova.


- «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj»
- 160-a datreveno de Zamenhof
- VK-gupo «Informu!» https://vk.com/informado





# Premioj, fondusoj, subvencioj

- Esperantisto de la jaro
- Esperanto-instruisto de la jaro
- La fonduso «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev»
- Porokazaj premioj kaj subvencioj



# Renkontiĝoj

- Rusia Esperantista Kongreso (REK)
  10-a SEU/REK en 1991, 27-a REK en 2011
- Rusiaj Esperano-Tagoj (RET)



Dum RET–2017 en Poŝeĥonjo



Komuna foto de RET–2018 apud Ŝuja

# En la jaro 2020: IKBE-86

- Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj.
- La IKBE-86 okazos de la 27-a de junio ĝis la 4-a de julio 2020 en Moskvo.
- Kongresa temo: «Esperanto kaj muziko unuigas nin».
- 250–400 € por la tuta periodo depende de la ĉambrospeco.

- Organiza teamo:
  P. Rjabov, A. Masenko, V. Suslov (REAN/LIBE),
  Svetlana Smetanina (REU).

LIBE: http://www.libe.slikom.info/

Anatolij Masenko: masenkoai@mail.ru

# En la jaro 2020: RET apud Krasnojarsk

- La 10–19-an de julio 2020 inkluzive:
  - flosado laux Mana (10–12)
  - restado en la bazejo (12–19)
- Aliĝkotizo
  - por REU-membroj estas 1300 ₽
  - por nemembroj 1500 ₽
  - Infanoj ĝis la 16-jaraĝo inkluzive — 0 ₽
- Loĝado + manĝado:
  1550 ₽ / diurno
- Flosado (pagata aparte):
  4500 ₽ por tuta periodo (10–12)




http://reu.ru/kalendaro/informletero/RET-2020

http://reu.ru/kalendaro/alighilo/RET-2020/

# Kontaktoj

Paĝaro: http://reu.ru/

Dissendolistoj:
- reu-agado@yahoogroups.com
- esperanto-rus-informoj@yahoogroups.com

VK-grupo:
https://vk.com/reu_vk

FB-grupo:
https://www.facebook.com/esperantoreu/

E-mail: estraro@reu.ru, prezident@reu.ru



# Dankon pro la atento!